EKO 2022
Esperiga Komuniko
Subtene al la regiona, landa kaj loka agado
UEA
Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 17>** ● Italio ● Ni semas ● Ljubljano ● Kleriga Lundo pluas **< mar. 16**

## Reta seminario el Italio – aliĝu tuj!

IEF (la Landa Asocio de Italio) kaj IIE (la itala akademio) invitas vin partopreni en la venonta senpaga reta seminario:

PEDAGOGIO DE LA ERARO: de TEORIO al PRAKTIKO.

Ĝi okazos per ZOOM, la 19an de marto 2022, de 15:30 ĝis la 18:30 (UTC+1) fare de Laura Brazzabeni kaj Pedro Aguilar Solà**.** Por aliĝi bonvolu plenigi la formularon:

https://forms.gle/tr4fLaq46fNWb14P6

Por informoj skribu al: paolamaria.nigrelli@gmail.com

Post la seminario vi povos ricevi partoprenatestilon.

prof. laura brazzabeni
+39 3286461063 (anche whatsapp), direttore generale IIE

## Programo "Ni semas". Proponoj ĝis marto-marto-fin'



"Ni semas" estas programo de Universala Esperanto-Asocio (UEA), lanĉita en 2015 kiel subvenciprogramo por malgrandaj Esperanto-projektoj. En 2022 ĝia regularo estis reviziita kaj nun la programo funkcias **sub kunordigo de la Afrika Komisiono de UEA** (AK) kun fokuso al Esperanto-projektoj en Afriko. Kadre de la programo la AK de UEA anoncas konkurson pri subvenciotaj projektoj en la kontinento. Interesatoj partopreni devas koni la regularon kaj preferinde uzi la konkursan petilon, elŝuteblan en PDF-formato aŭ rekte plenigeblan komputile (mallonge.net/Ni-Semas-Reta-Petilo).

La subvencipetoj povas temi pri: Esperanto-kursoj por komencantoj aŭ progresantoj; trejnseminarioj por instruistoj; ekzamenpreparoj kaj ekzamenoj; aperigado de lernolibroj kaj aliaj instrumaterialoj adaptitaj al afrikaj bezonoj (afriklingvaj kaj afrikec-enhavaj); kultura interŝanĝo kun aliaj mondopartoj per Esperanto; financado por sendo de skrib- kaj lern-materialoj por lernantoj; informa agado en superaj lernomedioj; ktp.
La proponoj konsistu el priskribo de la projekto (ne pli longa ol unu paĝon) kaj financa plano de la projekto sur alia paĝo. La financa plano klare indiku la bezonatan

sumon: la programo subvencias per maksimume 100 EUR; se la bezonata sumo superas tion, la projektoportanto devas klarigi la fontojn de la alia parto. Oni prefere uzu la petilon por sendi la petojn. Ĉiuj koncernaj dokumentoj kaj dosieroj rilate la petojn devas esti senditaj al la retadreso nisemas@co.uea.org, kies ricevantoj estas membroj de la Afrika Komisiono. La limdato por ricevi la unuan serion de projektoproponoj estas la

**31-a de marto 2022**.

La kriterioj por aljuĝo de la plena subvencio baziĝos sur la realismo de la projekto kaj de la petata financa subteno. Oni rajtas peti subtenon por pli ol unu projekto dum unu jaro. La kapablo de la petantoj mem financi parton de la kostoj aŭ trovi aliajn fontojn aldone al la petata subvencio ne estas nepra kondiĉo, sed faktoro konsiderota.

Esperantistoj dezirantaj subteni la programon kaj la Esperanto-agadon en Afriko povas fari liberajn donacojn al la Fondaĵo Afriko de UEA:

uea.org/alighoj/donacoj/afriko.

Komento SMG: Ni emfazas, ke projektoj el aliaj kontinentoj estas ankoraŭ konsidereblaj!

## Belarte – bonfarte, bonvarte

Miguel Fernández legas la mikronovelon "Mia sozio" de Jorge Rafael Nogueras. Unua premio en la Belartaj Konkursoj de UEA 2021.
https://youtu.be/LAyukftfmr0

mga

## Slovenio vere reaktiviĝis! Nun turisme


Aperis finfine esperanta turisma prospekto de Ljubljano. Ni alkroĉas ĝin kune kun la QR-kodo por ke oni povu atingi la prospekton ankaŭ per poŝtelefono rekte en la retejo de la urba organizo »Turizem Ljubljana«. Bonvolu uzi la dosierojn kaj disvastigi ilin. Ljubljano estas vizitinda! La slovena versio de tiu faldfolio estis eldonita papere en decembro 2019, la angla en januaro 2020. Esperanten tradukis Milan Škrlj kaj Ostoj Kristan, kontrollegis Janko Štruc kaj Elda Doerfler. Sekvos eldono de la faldfolio papere.

Ostoj Kristan

## Kleriga lundo pluiras – memore kaj honorige

Post la forpaso de mia granda amikino Claude, oni konfidis al mi la organizadon de la Kleriga Lundo en Montrealo. Mi invitas ĉiujn kiuj en la lastaj monatoj havis kontaktojn kun Claude, ĝisdatigi min pri la ideoj, sugestoj, jam planitaj eroj, por ke mi povu rekapti la fadenojn de ĉio.





Michela Lipari

michela.lipari@gmail.com

## Libroj al Afriko

Italio agas forte pri la uzo de iliaj libroservaj stokoj por nutri dezirojn el Afrika. Maldekstre, libropakego por sendo al Maroko por kontribui al ilia biblioteko. Dekstre, kelkaj el la irantaj libroj, kiuj ja iris al pluraj landoj. Francio organizis similajn sendojn.







## Nova kurso en Brazilo

La redaktoro de [edukado.net](edukado.net) informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Baza Friis-kurso de Esperanto
Gvidantonomo: Cícero SOARES
Tipo: Nova movada kurso
Urbo: Salvadoro BA, Bahia, Brazilo
Aldoninto: kikero

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27406

## Korekto pri la retadreso de IKUE

En EKO 16 (la komuniko el infero, laŭ mia perspektivo) mise aperis la retadreso de IKUE: devis esti <ikue<ĉe>gmail.com>. Krome, ne aperis la informo, ke sanktulo Titus ja estis membro de IKUE kaj aperis artikoloj de kaj pri li en la organo de IKUE.

En EKO 18 aperos pliaj postsekvoj de EKO 16.

========= vortoj: 730 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de 2021 (per EKO 2021-58). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.